EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IFEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 54> ● Analafabeteco ● Zimbabvo ● Barato ● Serbio < septembro 30**

# ILEI kaj la Internacia Tago kontraŭ Analfabeteco



La Internacia Tago kontraŭ Analfabeteco estis difinita en la 14-a kongreso de Unesko en novembro 1965. Estis decidite, ke la 8-a de septembro ĉiujare estas la Internacia Tago kontraŭ Analfabeteco, kaj la jaro 1990 estis la Internacia Jaro kontraŭ Analfabeteco. Tio celas, ke ĉiuj landoj kaj internaciaj organizoj donu atenton al senigo de analfabeteco kaj akcelu popularigon de elementa edukado, altigon de meznivela edukado, kaj infanoj de lerneja aĝo povu iri al lernejoj. La fina celo estas akceli interhoman komunikadon, senigi homojn je diskriminacioj kaj akceli kulturan disvastigon kaj socian disvolvon. Rigardu filmon ĉe:

https://esperanto.cri.cn/2022/09/14/ARTIgz9NsEi7ZSyqOIqCsjvM220913.shtml?spm=C78862.PRNuFZLwc3VH.S12431




Unesko donis premiojn al 85 eminentaj kontribuantoj kaj novigantoj en tiu ĉi kampo. La ĉina registaro aparte investis monon por establi en Unesko "Konfucean Premion kontraŭ Analfabeteco", kiu ekde 2006 ĉiujare estas disdonaita al premiitoj kun 20 000 usonaj dolaroj. En 2018 Unesko diris, ke monde almenaŭ 750 milionoj da homoj ne havis fundamentan leg-skriban kapablon, multaj el 192 milionoj da senlaboruloj ne povis trovi bonan laboron kaŭze de manko de lega kapablo. Kiaestas la stato en Ĉinio? Laŭ donitaĵoj de la ĉina Ministerio de Edukado en junio 2022, post dekjara forta disvastigo de nacia komuna lingvo, la popularigo debook la ĉina moderna komuna parollingvo altiĝis de 70% al 80,72%, pli ol 95% de la loĝantaro kun leg-skriba kapablo uzis la norman ĉinan lingvon kaj la proporcio de analfabetoj malaltiĝis al 2,67%.

En Esperantujo, ILEI estas la faka asocio de UEA aparte pri edukado, do ni invitu la prezidanton de ILEI doni siajn vortojn al tiu ĉi specifa tago.

Laŭ raporto el Ĉinio

# Akademia kongreso aŭdos pri Eo-vortaroj



Ĉe ni ankaŭ en akademia almanako finfine publikiĝis artikolo de nia esperantista amikino Pınar Sel pri "Esperanto-vortaroj en Turkio". Antaŭe ĝi estis prezentita en akademia kongreso (la 5-a internacia kongreso de la turkaj lingvo kaj literaturo), kaj finfine ĝi estis publikigita en tiu almanako.

Vasil Kadifeli, Turkio.

# La urbo de UK en 2002 plue aktivas

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza Kurso de Esperanto
Gvidantonomo: José Roberto Alves de Albuquerque
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Fortalezo, Brazilo
Aldoninto: Jozeforoberto

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27447

# Kaj same la insulo Reunio kaj Francio

la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Gvidantonomo: Greta (Maggy) Combot
Tipo: Nova kurso
Loko: Bois-de-nèfles (St. Denis), Reunio
Aldoninto: MaggyMaggy

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27448

Nomo: Kurso por komencintoj per videokonferencoj
Gvidantonomo: Claude Labetaa
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Bassillac, Francio
Aldoninto: Rubekolo
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27449

# Deklaro pri indiĝenaj popoloj el la UK

Vi trovos tiun deklaron en https://uea.org/vikio/Kategorio:Esperanto_por_indighenoj/praloghantoj.Bonvolu uzi ĝin por informado en Paragvajo kaj en aliaj sudamerikaj landoj. [SMG: kaj alilande!}

La informa reto de UEA vastigas sin: <informa-reto-pri-Esperanto@groups.io>

Tiu listo celas havi reprezentantojn de ĉiuj landaj asocioj, kiuj provas traduki al naciaj lingvoj la komunikojn de UEA kaj disvastigi ilin en sia lando

Ambaŭ de Renato Corsetti

# Progreso en Zimbabvo

Jen lando kiu ne figuris sur nia movada mapo tra multaj jaroj. La 17-an de septembro okazis la elementa  ekzameno en Zimbabvo (la parola ekzameno) kie  ses lernantoj ĉeestis. La instruisto ankaŭ faris la mezan ekzamenon. Dank' al la ekzamenintoj precipe d-ro Elisée Byelongo de la Afrika Komisiono de UEA, d-ro Renato Corsetti, s-ino Françoise Noireau kaj s-ro Ahmad Manduhi.de ILEI.

Benjamin Kabwe

EKO nun laboras por ricevi proponojn pri membrigo en UEA por la plej aktivaj homoj, jam pretaj por membreco. Se necese per Fondaĵo Canuto. Informoj de kaj pri UEA nepre eniru la landon!

# Barato gvidas universitatan kunvenon

En septembro 2022 okazis "Reta seminario pri Esperanto". La kun-organizantoj estis la civilsocia organizaĵo Tritiyo [tritijo] Parisar (La tria spaco) kaj la Fakultato de lingvoj kaj lingvistiko de Universitato Jadavpur [ĝadavpur] en Barato. Dum 2-3-horaj vesperaj sesioj dum tiuj kvar tagoj, barataj esperantistoj parolis bengale kaj angle pri diversaj temeroj.

Ĉiuj videoj estas spekteblaj ĉi tie:
https://youtube.com/playlist?list=PLrmDfO0uJisw4CeLokVtBKnnEbDrc3Gic.

En la programo prelegis Probal Dasgupta: 'Kion Esperanto povas doni al vi (bengale) kaj A. Giridhar Rao: 'Lingvaj homaj rajtoj kaj Esperanto en barata universitato' (angle).

Okazis pluraj intervjuoj (interesa formato): 'La Esperanto-kolektivo en Barato ekde 1982: malstrikta homa forto (angle) - Potturu Ranganaya-kulu intervjuita de K. Naga Siva Kumar; Instrui Esperanton al bengall-ingvanoj (bengale) - Sovona Ghosh intervjuita de Gairik Patronobis Esperantaj eldonaĵoj en Okcidenta Bengallando ekde 1980 (bengale) - Syam Sundar Pal intervjuita de A. K. Nandy; Esperanto kiel sperto: rakontas veterano (bengale) - Arun Kumar Bhattacharya intervjuita de Mina Dan.

Pliaj prelegoj: Elmontri scienc-esploradon: junaj barataj esperantistoj en la Esperanto-medio (angle) - Snehaja Venkatesh; Esperanto kaj beletra tradukado: barata perspektivo (bengale) - Subha Chakraborty. Snehaja Venkatesh prezentis siajn spertojn kiel estro de la scienca komisiono de TEJO. Entute la partoprenantoj povis plividebligi Esperanton. Kaj por la neesperantistoj estis pluraj novaĵoj -- kaj lingvaj kaj kulturaj.

Giri RAO, Bengaluro, Barato <agiridhar.rao@gmail.com>

# Pariza progreso por progresantoj

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso por progresantoj en Parizo
Gvidantonomo: Marianne PIERQUIN

Tipo: Nova movada kurso
Loko: Parizo, Francio
Aldoninto: marianne94
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27450

## Morfologia studo nun akirebla

En la libroservo de UEA aperis la libro 'Enkonduko en la morfologion de Esperanto' (EME) de la pola esperantologo Ryszard Rokicki, kiun ĉi-somere kuneldonis la Ruslanda eldonejo "Sezonoj" kaj Litova Esperanto-Asocio. Legu pli pri EME kaj, se vi interesiĝas pri Esperanto kiel lingvo, mendu ĝin
https://sezonoj.ru/2022/09/eme/

## Informado en Serbio per la BBC

Hodiaŭ aperis longa artikolo pri Esperanto kaj Esperanto en Serbio, serblingve en BBC, okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj:

**https://www.bbc.com/serbian/lat/srbija-63028612**

Dankegon al la kontribuantoj, Jovan kaj Radojica, kaj same al la bonvolo de Saša. Mi sendis la kontakt-telefonojn de ni kvar al la ĵurnalisto (Saša, Jovan, Radojica kaj mi).

Aranka Laslo

## France, bonŝance

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Espéranto Le Beausset
Gvidantonomo: Lafitte Nicole
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Le Castellet, Francio
Aldoninto: mirann

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27452

========= vortoj: 1010 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.